# LA JUNA IDEO

Unua jaro Nro 3
1 Julio 1936
aperas dumonate:
Abonprezoj:
Belgio 5 B. fr.
aliaj landoj 1 Sv.fr.
Grupoj de almenaŭ
4 abonantoj:
Belgio;po abonanto 3
al.landoj " " 5
pligrandaj grupoj
skribu al ni.



## P r e ĝ o p o r n i a t e m p o .

Dio, faru min instrumento por via paco,
ke mi alportu amon, kie estas malamo,
ke mi pardonu, kie estas kulpo,
ke mi unuigu, kie estas malkonsento,
ke mi alportu veron, kie estas eraro,
kredon, kie estas dubo,
esperon, kie estas malespero,
vian lumon, kie estas mallumo,
ĝojon, kie estas ĉagreno
ne por esti konsolata, sed por konsoli,
ne por esti komprenata, sed por kompreni,
ne por esti amata, sed por ami;
Nur ĉi tio gravas, ĉar
donante, oni ricevas,
forgesante pri si mem, oni trovas,
pardonante, oni ricevas pardonon, kaj
mortante oni eniras la eternan vivon.
(Laŭ preĝo de Sankta Francisko de Assisi)

Tiu preĝo, kiu estas preĝata de la "Pioniroj de la Sankta Francisko" ankaŭ ni dumkongrese ĉiutage preĝos

---

## K r i t i k o !


Kelkaj homoj maltrankviliĝis, legante en Nro 2 ke ni pensas, ke nur la katolika junularo povas esti idealista ! Se ni ion similan skribis, estas laŭ sekvanta senco:

Litere "katolika" signifas: universala. Laŭsence ĝi indikas la vastecon de la pensado, limigita nur per la vero, kiu devas esti serĉata. Ju pli ni serĉas la veron, des pli bone ni estas katolikaj. La katolika vivo estas la vivo serĉanta ĉiurilate la veron, ĉar ni scias ke la tutkompleta vero estas Dio. Kaj ju pli bone ni iorilate alproksimiĝas al la vero, samtempe ni des pli bone alproksimiĝas al Dio, kiu estas la tutkompleta Vero ! Tiel, pensante laŭ la esenca signifo de la vorto, ni ankaŭ rajtas diri ke multoj, estantaj ekster la limoj de la Eklezio, estas tamen katolikaj; kaj reciproke ke kelkaj en la Eklezio tute ne estas katolikaj, ankaŭ tial ke ilia malgranda pensado estas limigita per antaŭjuĝoj multspecaj.

Idealistoj laŭ ni estas nur tiuj, kiuj sincere serĉadas la veron, kaj laŭ la akirita vero konsekvence agadas. Do, ĉar la vortoj "idealista" kaj "katolika" estas sinonimoj, ni uzis ambaŭ samsence.

oooooooooooooooooooooo

B a b i l a d e t o : Junaj kamaradoj ! Iom haltis la bruo. Jam du numerojn ni devis plenigi, luktante kontraù miskomprono. Sed jen, nia vojo formiĝis kaj la konstruanta laboro komenciĝas por ni ĉiuj. Ankaù por vi, juna leganto, ĉar ni atendas de vi pli ol nur legadon de nia revuo ! Precipe kunlaboron ni atendas. Nia revuo estu la diskonigilo de la juna voĉo en Esperantujo !
ENSENDU vian penson pri la enhavo, kaj ENSENDU ion publikigeblan! Priskribu libere viajn travivaĵojn aù egale kion ajn. Nur rimarku ke ĝi ne estu laù lerneja maniero ..... Ni tre ĝojus ricevi multe de niaj junuloj. Kiu estos la unua juna ensendanto ? ?
Ĉar grandparte knaboj abonis, ankaù nia revueto estonte grandparte estos skribata por ili. Tamen ankaù la pliaĝaj junuloj disponos pri loko.
POR LA NEDERLANDANOJ ni havas belan novaĵon: La tiel bone konata Onklo Johano promesis al ni sian tutan helpon; Do de post nun abonprezojn kaj artikolojn sendu nur al: Onklo Johano,
61, Schotersingel, HAARLEM-N.
Vivu "la Juna Ideo" !!! . . Todibo.



Brugge

Okazos Radio-elsendo de la Katolika Esperantista junularo Nederlanda la 22an de Aùgusto el Hilversum de 5.28-6.03 h. (Belga tempo)

BONVOLU NOTI - RADIO elsendoj.
Kiam estas en Amsterdam (Nederlando) 12 h.(tagmeze), estas en:
Meksikio: 5 antaùtagmeze

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| New-York | 6,42 | " | Florence | 12,25 | tagmeze |
| Rio de Janeiro | 8,50 | | München | 12,26 | " |
| Madeira | 10,30 | " | Roma | 12,30 | " |
| Dublin | 11,15 | " | Kobenhavn | 12,31 | " |
| Madrido | 11,25 | " | Berlino | 12,34 | " |
| Edinburgo | 11,27 | " | Vieno | 12,46 | " |
| Londono | 11,40 | " | Kaapurbo | 12,50 | " |
| Parizo | 11,50 | " | Danzig | 12,55 | " |
| Bruselo | 11,58 | " | Koningsbergen | 1,03 | " |
| Genève | 12,05 | tagmeze | Constantinoplo | 1,36 | " |
| Kolonjo | 12,09 | " | Leningrad | 1,41 | " |
| Turino | 12,11 | " | Moskvo | 2,11 | " |
| Milano | 12,17 | " | Batavio | 6,50 | vespere |
| Hamburg | 12,20 | " | Peking | 7,15 | " |

E n i g m o j — Kiu trovos pri kio mi parolas ? ? ? ? ? ? ?
(Solvo aperos en sekvanta numero)

1. Oni ĝin envenas tra unu truo; oni ĝin eliras tra tri truoj; kaj tiam oni estas tutbone en ĝi !

2. Mi havas ion.
Mi ŝatus ne havi ĝin ! ...
Se mi ĝin havus ,
tiam mi ne plu havus ĝin;
Sed mi ĝin ne jam havas , -
do mi ĝin ankoraù havas.



Preĝejo kaj tereno vin invitantaj.Memoru la daton de 24 ĝis 29 Aùgusto ! !

PROGRAMO de la INTERNACIAJ KATOLIKAJ JUNULARTAGOJ en BRUGGE,
de 24 ĝis 29 Aùgusto 1936.

24 Aùgusto: Alveno de partoprenantoj kaj partoprenantinoj;
20 h. oficiala malfermo de la tagoj

25 Aùg.: 6h. ellitiĝo - 7 h. Sankta Meso - 8 h. matenmanĝo - - 8,30 h. ludoj - 12 h. lunĉo - 13 h. ripozo -13,30 h. paroladeto - Ŝtudkunveno - 16,30 h. ludoj -18 h.vespermanĝo -19 h .vizito al la urbo -21 h. vesperpreĝo - dormo

26 Aùg.: 6 h. ellitiĝo -7 Sankta Meso -7,45 matenmanĝo -8,30 ekskurso per boato al la maro -16,30 Teorio pri arboj kaj plantoj -18 vespermanĝo -19 vizito al urbo kaj aùdo de sonorilarkoncerto -22 vesperpreĝo - dormo

27 Aùg.: 7 ellitiĝo -8 Sankta Meso -9 matenmanĝo -10 promenado al Loppem -Dume kolekto de plantoj kaj floroj -18 vespermanĝo -19 E;H;B;O; -21 kampfajro -22 vesperpreĝo - dormo

28 Aùg; -7 ellitiĝo -8 Sankta Meso -8,45 matenmanĝo -9,30 ludoj kunveno -12 lunĉo -13,30 ekzercado por bone paroli publike -kritiko -18,30 vespermanĝo -19,30 filmvespero-22vesperpreĝo

29 Aùg.:-7 ellitiĝo -8 Sankta Meso -9 matenmanĝo-10 piedpilkludo 12 lunĉo -fino de la junulartagoj

La aliĝprezon estas fiksita, ĉion enkluzive, po 15 Ŝvisaj frankoj. Kie necese ni donos rabaton.

Membroj de la honorkomitato estas:

Honorprezidanto: Sro P. Heilker el Hoofddorp (Nederlando)

Honormembroj: Reverenda Fratino Ignace el Arnhem (Nederlando)
Reverenda Pastro Poell el Gemert (Nederlando)
Referenda Frato Wigbertus van Zon el Vught (Nederl.)
Sinjoro L. Calloens el Aalst (Belgio)
Sinjoro H. Damen el Busko Duko (Nederlando)
Sro Dro H. Moller el Tilburgo (Nederlando)
Sro Dro W. Solzbacher el Bereldange (Luksemburgo)
Sinjoro Edmond Patiny el Watermael-Bruselo (Belgio)
Sinjoro J. van Gulck el Antverpeno (Belgio)
Sinjoro v. Weerhorst el Nimego (Nederlando)

Estas nepre necese ke ĉiuj,kiuj partoprenos tuj sendu ilian adreson al la loka komitato: Fernand Roose, Guido Gezelleweg, 15,BRUGGE,Belgio

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%


Sekvontfoje vi legos artikolon pri nia antikva, belega kongresurbo Brugge;

**Mallonga historio** de nia katolika junulara Esperanto-grupo (Brugge)

(Ĉi tiun kronikon ni volus skribi en pitoreska mezaĝa lingvo, kiel ofte faras niaj naciaj studentoklubo j. Ĉi tie ni ne povas fari tion. La leganto ja bone komprenas kial..)

Estis dimanĉo. Jes, estis dimanĉo. Mi ankoraŭ bone memoras. Car jen, mi diros al vi: post la tagmanĝo mi estis promeninta kun familio al konatulinoj: du maljunaj fraŭlinoj. Ĉu vi ne konas ilin ? Tiuj kiuj antaŭe loĝis en mia strato. Ili ĉiam estas solaj tiuj malfeliĉulinetoj; kaj mi diris al mi: jen mi foje vizitos ilin; tio faros multe da plezuro al ili, ĉu ne ? Alie ili ĉiam estas solaj, ĉu ne ? Kaj poste mi iris al la ekspozicio, kiun organizis la Bruĝa grupo esperantista -groupe Espérantiste brugeois -Brugsche Esperantistengroep- (Nun ĝi estas reĝa - sed tiam ĝi ne jam estis reĝa). Mi tie diris al la prezidantino, ke mi decidis fondi junularan Esperanto-grupon. Por kompreni tion, vi devus scii, kio kondukis al tia ago; vi devus koni la tiel nomatajn retroaktojn de la solena deklaro de la la Oktobro.

Nia lando vivas ankoraŭ sub la superpotenco de la ekleziularo. Do tiu ekleziularo povas permesi al si teni siajn subulojn sub severaj reguloj. Unu el tiuj reguloj, pro kiu la kolegiaj studentoj suferas, estas ke ili ne povas aliĝi al kia ajn societo ekster la kolegio. Estis do ne sen danĝero ke mi, estante en la kvara latina klaso, aliĝis al la Esperantogrupo, kiu, krom tio, estas ankaŭ duseksa. Ĉiujare dum la propagandotempo por nova kurso, mi sukcesis varmigi kvin aŭ ses studentojn por la Esperanto-idealo. Sed post iom da tempo la afero iĝis tro danĝera por ili; iliaj gepatroj ne estis kontentaj; ili devis hejme resti. Tiel ke preskaŭ tuta mia laboro estis vana. Tion mi klare vidis kiam mi foriris el la kolegio kaj kiam mi fine estis libera.



-Floranta prezidanto- kaj feliĉa profesoro-

Estis ankoraŭ alia faktoro. Ni estas junaj; kaj ni vivas en la postmilita unua duono de la dudeka jarcento ! Bone pripensu tion kaj vi komprenos min. Jam antaŭe mi parolis pri tio al nia prezidantino, kaj sekve mi jam venigis kelkajn amikojn kiuj estis lernintaj nian lingvon kaj aliajn kiuj intencis lerni ĝin. Tiu unua kunveno fakte estis nur provo. Ni ĝenerale opiniis ke ni devas krei Katolikan grupon por esti tolerata de la ekleziularo.(Plejgrandparte ni konsistas el kolegiaj studentoj).Tio estus la kaŭzo ke ni ne havus varbokapablecojn ĉe la nekatolikaj junuloj. Post tiu kunveno estis granda demanda signo. Sed nia projekto tute falis kiam ne malpli ol kvar el niaj membroj destinis sin al la monaĥa vivo. Ni devis atendi kaj prokrasti.

(daŭrigota.) Profesoro X.

Adreso de la prizorganto: Leo Bruggeman, Annuntiatenstr.81, Brugge Belgio
P.Ĉekkonto 404059.